SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 15, n-ro 1/2 (1965)

## EL LA FAKOJ
## (SCIIGOJ DE LA TERMINOLOGIA CENTRO DE I. S. A. E.)

**(ISAE-TC-113,115)**

**(La fakoj estas envicigitaj laŭ la UDK)**

54 **Kemio.** — Aperis en Varsovio, Januaro 1965, **Terminaro de kemiaj afiksoj** de dipl. inĝ. kem. J a n P i ó r o (Piastów apud Varsovio), dua plibonigita eldono. 57p.; 14,8 × 21,0 cm; hektografe multobligita, broŝurita. Enhavo: I. Alfabeta listo de la kemiaj elementoj; II. klarigo de la mallongigoj; III. kemiaj afiksoj. — La aŭtoro pledas por unuecigo de la finaĵoj kaj afiksoj de la kemiaj elementnomoj. Ĉar aliigi kelkajn finaĵojn de nomoj, tio signifus peko kontraŭ la netuŝebla Fundamento kaj postulus sankcion flanke de la Akademio. Pro tio unue necesas recenzo kaj kritiko de la terminaro far kemia esperantisto-fakulo.

55 **Geologio.** — »Vulkanologian Terminaron« estas verkanta s-ro J o s e f K A V K A, Luzna 7, Vokovice, Praha 6, Ĉeĥosl. Li sendis al TC apartpresaĵon de sia esperantlingva artikolo de fako geologia al la difino, klasado kaj nomenklaturo de la fonolitecaj vulkanrokoj aperinta en »Acta Universitatis Carolinae no. 1, Pag. 43-59, 1964«.

621.3 **Elektrotekniko.** — Inĝ. L. -R. W e l t h e r (Rumanio) donace sendis al T. C. diversajn partojn (Grupojn n-ro 08, 11, 15, 20, 30, 31, 35) de la 9-lingva rusa eldono de la **International Elektrotechnical Dictionary,** aperintaj en Moskvo 1963. La



rusa eldono enhavas difinojn en la rusa, franca kaj angla. La volumetoj estas bonaspektaj, tole binditaj de oportuna formato 13 × 20,5 cm.

621.3 **Elektrotekniko.** — Mgr-o inĝ. K. S i w i c k i (Elektroteknika Grupo de **Pola Esperanto-Asocio**) ĝis nun tradukis jenajn Grupojn de la IEC-Vortaro: 05, 07, 08, 10, 11, 12, 15, 16, 20, 30, 31, 35.

621.396 **Radiofako.** — Al la **Radio-Terminaro** de **Alec Venture** (unua eldono en la Jarlibro 1943 de **IEL,** dua neŝanĝita eldono 1962 de Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado) la T. C. (R. H a f e r k o r n) verkis **ĝustigojn** kaj **komentojn,** kiujn presis en 1964 s-ro R ü d i g e r E i c h h o l z (Esperanto Press, Kanado) en sia ofset-presejo sur unu folio. La tie indikitaj paĝ-numeroj referencas al la paĝoj de la dua eldono.

625.1 **Fervoja terminar(et)o.** — **IFEF** intencas verki esperantan tradukon de la UEC-Leksikono ampleksanta ĉ. 8000 terminojn. La duono de la verko jam estas tradukita kaj la manuskripto reviziita. En la Terminara Komitato (TK) de **IFEF** oni nun preferas, provizore elekti el la verko ĉ. 2000 plej gravajn terminojn kaj eldoni ilin kiel terminareton.

629.113 **Aŭtomobilfako.** — La Komitato de UEA komisiis s-ron **Maurice G. D. Jaumotte** (Wilrijk/Antwerpen), Estrarano de UEA pri landaj kaj fakaj asocioj kaj delegita reto, starigi Aŭtomobilistan Klubon kaj ekverki **Aŭtomobilistan Vortaron** en kunlaboro kun s-roj T. S e k e l j (Beograd) kaj G. G r a t t a p a g l i a (Torino). La seslingva terminareto (Eo-A-F-G--I-N1) ilustrita estas publikigata laŭ daŭrigoj en la organo de la Klubo »Aŭto-Revuo«, kies unua numero aperis en Januaro 1965.

634.9; 639.1 **Arbara kaj Ĉasa Terminaro.** — D-ro E r n s t K l e e m a n n, eksa superforstmajstro (Fritz-Kalle-Str. 26, 62 Wiesbaden, estas preparanta »Forsta kaj Ĉasa Leksikono« n. Unue li pritraktis la gravajn forstajn arbojn kaj ĉasajn bestojn, elirante el la sciencaj vortoj latinaj.

66.084: 621.791 **Ultrasona provado en la velda tekniko.** — Esperantan vortliston, anekson al la 9-lingva »List of terms used in

ultrasonic testing« (eld. de International Institute of Welding) preparas Inĝ. I. Schleicher, Ved Bellahoj 21.13, Kopenhago BRH, Danujo. La listo estos kontrolata de T. C. Esperantan anekson favoras la **Akademio de teknikaj sciencoj en Kopenhago.**

665.5 **Petrolo. Prilaborado, precpe distilado kaj rafinado de mineral-oleoj.** — Pri ĉi tiu fako deziras interŝanĝi spertojn Inĝ. O. Puia, str. Basarabi, Bloc. Sc. G. Ap. 4, Ploiești, Rumanio.

669.162.2 **Altfornoj, industriaj fornegoj, ferprodukteja scienco.** — Pri ĉi tiu fako preparas terminaron s-ro S. Bencsik, Bartók u. 6. III. 3, Dunauváros, Hungario. Pri la sama fako deziras interkorespondadi Inĝ. O. Puia, str. Basarabi, Bloc. Sc. G. Ap. 4, Ploiești, Rumanio.

77 **Fotovortaro.** — S-ro Vilho Setälä (Finlando) dum Majo 1964 finis manuskripton de fotovortaro finna adaptita por la konkorda uzado apud la D-F-E-R serio Fotokino-Wörterbuch de Fotokino-Verlag en Halle (Saale), enhavanta 17.359 terminojn. Li nun daŭrigas verki memstaran Fotografan Terminaron Esperantlingvan.

R. Haferkorn

**J. RÉGULO - ELDONISTO**
Apartado 25

LA LAGUNA - Tenerife
Kanariaj Insuloj

aperigis **Jubilean Katalogon**
de la unuaj 50 volumoj

de STAFETO

el kiu ni eltondis tion kio nepre interos niajn legantojn

**POPULARSCIENCA SERIO**
16×24 cm

STAFETO komprenis, ke, apud la beletra, necesas paraleligi Popularsciencan Serion, kiun oni planis por kunhelpi la evoluon de nia faka literaturo kaj penetrigi nian lingvon en sciencajn rondojn. Tiu ĉi dua serio debutis en 1947, kaj jam kalkulas la jenajn titolojn:

1. Paul Neergaard: LA VIVO DE LA PLANTOJ. Kun preskaŭ 100 desegnaĵoj de Mads Stage. 1957. 128 p. 2.00

2. Tibor Sekelj: NEPALO MALFERMAS LA PORDON. Riĉe ilustrita kun nigraj kaj koloraj bildoj. Leksikologia komentario de J. Régulo Pérez. 1959. 214 p. Us. dol. 3.00

3. Leander Tell: LA BELA SUBTERA MONDO. LIBRO PRI GROTOJ. Riĉe ilustrita kun pli ol 50 eksterteksta j bildoj. 1959. 96+24 p. 2.00

4. W. E. Collinson: CIVILIZO KAJ LINGVO. Ĉirkaŭ 200 p. Presata